



Erasmus+  
KA220-YOU

Projekto pri la  
propedeŭtika valoro  
de Esperanto



## Ĝenerala priskribo

La jena propono temas pri projekto por prezenti ene de la kadro de Erasmus+. Pli specife, ene de la kategorio KA220-YOU, pri koopera partnerado je junularo. La projekto fokusiĝas je la propedeŭtika valoro de Esperanto (la valoro de Esperanto kiel lingvo kiu utilas por rapidigi kaj faciligi la lernadon de aliaj lingvoj). Ĝi aldone montras la utilecon de Esperanto kiel ilo por alproksimigi homojn, malkovri aliajn kulturojn kaj konstrui civitanecon kaj demokration. Tiu fokuso estas direktita al junuloj, ĉar ĝi estas la vivetapo kiam oni malfermas sin al la mondo kaj plej da tempo dediĉas al la lernado de lingvoj.

## Laborpakajoj

La projekto mem estas kompleksa, ĉar ĝi kovras ekde la teoria analizo de la propedeŭtika valoro de Esperanto ĝis la realigado de la uzo de Esperanto en internacia etoso. Ĝi estas dividita en 7 laborpakajoj:

1. Administrado de la projekto [mallonge (A) por Administrado];
2. Esplorado pri la propedeŭtika valoro de Esperanto [mallonge (E) por Esplorado];
3. Pretigado kaj eldono de instrua materialo [mallonge (M) por materialo];
4. Trejnado de instruistoj [mallonge (T) por Trejnado];
5. Instruado de Esperanto al junuloj [mallonge (I) por Instruado];
6. Partopreno de junuloj en internacia junulara esperanta evento [mallonge (P) por Partoprenado];
7. Disvastigado kaj informado de bonaj praktikoj [mallonge (D) por Disvastigado].

## Celoj kaj liveraĵoj

Ĉiu laborpakajo havas specifan celon kaj el ili ni produktos malsamajn liveraĵojn, kiuj utilos por la laborpakajo kiuj sekvas ilin. Kelkaj el tiuj etapoj okazos paralele, kaj kelkaj devas atendi la finon de la antaŭa por komenciĝi. La celoj kaj liveraĵoj de ili estas la jenaj:

- A Zorgi pri la bona funkciado de la projekto kaj pretigi la diversajn raportojn por la agentejo de Erasmus+.
- E Esplori pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj la maniero por profiti el ĝi. Ene de tiu ĉi laborpakajo, ni publikos sciencajn artikolojn, subtenos la partoprenon en scienca kongreso kaj produktos raporton pri kiel transiri de la teorio ĝis la praktiko rilate al la propedeŭtika valoro de Esperanto.
- M Krei utilan materialon por la instruado de Esperanto. El ĉi tiu laborpakajo ni kreos lernomaterialojn en diversaj formatoj (libroj, ekzercoj, videoj, ktp.).
- T Por povi instrui Esperanton, ni bezonas havi spertajn instruistojn kiuj ankaŭ scipovas la lingvon, kiuj konas la diversajn ilojn per kiuj oni povas lerni la lingvojn, ktp. La celo de ĉi tiu etapo estas rapide provizi tiun konon al instruistoj, tial la liveraĵo de ĉi tiu laborpakajo estas trejni instruistojn pri kiel instrui Esperanton al junuloj. Inklude en ĉi tiu parto estas vojaĝigo de instruistoj al kongreso pri instruado, por kontribui al ilia lernado, ebligi ilin sperti la lingvon en malpli



prelegeca etoso kaj provizi aldonajn rimedojn kaj scion pri la lingvo kaj sia instruado.

- I La centra parto de la projekto temas pri la lernado de Esperanto, sed ne nur de la lingvo. Ĉi tiu etapo ĉefe temas pri instrui al junuloj Esperanton, sed ankaŭ la kernajn valorojn de la internacia lingvo. Logike, tio inkludas la utilecon de Esperanto por lerni aliajn lingvojn. Pro tio, el ĉi tiu parto de projekto junuloj lernos kaj la lingvon kaj aliajn elementojn. Ekzemple, ili lernos pri la kulturo de Esperanto, multkultureco, kontraŭdiskriminaciaj valoroj de Esperanto, la poliglota etoso de Esperantujo, ktp.
- P Por efektivi la lernadon de Esperanto kaj doni al la junuloj realan etoson kie uzi la lingvon, ĉi tiu laborpakaĵo celas partoprenigi la junulojn en internacia esperanta evento. Tiu ĉi oportuno utilos por plibonigi ilian konon de Esperanto, sperti multkulturan internacian etoson kaj konstrui pontojn inter junuloj de malsamaj landoj kaj devenoj. Aldone, dependante de la kvanto de partneroj, kaj intereso en la projekto, eblas sendi kelketajn junulojn al pli malgranda internacia junulara Esperanto evento.
- D Kutima parto de la Erasmus+ projektoj estas zorgi pri la disvastigo de tiuj projektoj kaj informi pri la maniero kiel la publika mono estis uzita. Tio inkludas kreadon de materialoj pri la bonaj praktikoj por ke oni povu lerni el la eraroj kaj sukcesoj. Tial, ĉi tiu laborpakaĵo konstante liveros informojn pri la antaŭeniro de la vojaĝoj, por disvastigi ilin en sociaj retoj, eventoj en la partoprenantaj lernejoj, eksteraj eventoj, ktp. Ĉi tiu ero inkludas finan eventon por konkludi la projekton kaj inviti eksterajn aktorojn por komuniki la rezultojn.

## Partneroj

La estra partnero estas TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo), kiu kunigas junajn Esperantistojn dum pli ol 80 jaroj kaj havas multjaran sperton pri mastrumado de internaciaj junularaj projektoj. Por ĉiu laborpakaĵo, diversaj profiloj de partneroj estas bezonata (esploraj institutoj, asocioj de instruistoj, Esperantaj organizoj, lernejoj, ktp.). Pro tio, kelkaj partneroj partoprenas en pli ol unu laborpakaĵo. Tiasence, la estra organizo respondecas pri kontroli la antaŭeniron de ĉiuj etapoj kaj la aliĝo de partneroj estas limigita al la laborpakaĵoj en kiuj ili partoprenas.

## Tempa skemo

La daŭro de la projekto estos 36 monata, komencante la 1-an de septembro 2023. Laŭ la laborpakaĵoj, la tempa skemo estos la jena:

- A 36 monatoj, ekde septembro 2023 ĝis septembro 2026. La raporto estos liverigita je la fino de la projekto.
- E 30 monatoj, ekde septembro 2023 ĝis marto 2026. La unua liveraĵo, raporto pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, estos pretigita post la 4 unuaj monatoj. La restantaj liveraĵoj, sciencaj artikoloj kaj partopreno en scienca kongreso, liveriĝos ene de la restanta tempo de la projekto.



- M 7 monatoj ekde septembro 2023 ĝis aprilo 2024. Liveri la materialon estos la fina parto de la laborpakajo.
- T 17 monatoj ekde aprilo 2024 ĝis septembro 2025. La unua liverado pri la trejnado de instruistoj finiĝos antaŭ la komenco de la akademia jaro 2024-2025, kaj la dua liveraĵo pri la partopreno de instruistoj en instruista kongreso okazos dum la akademia jaro 2024-2025.
- I 23 monatoj ekde aŭgusto 2024 ĝis julio 2026. Ĝi inkludas du akademiajn jarojn, sed la kerno okazos dum la unua akademia jaro. Dum 10 monatoj la lernejoj instruos Esperanton al junuloj, sed se la lernejoj volus ripeti la agadon, la projekto restos por subteni kaj helpi kun tia motivado. La liveraĵo fini la instruadon de junuloj devus fini maksimume kiam la kurso 2024/2025 finiĝas, antaŭ la someraj monatoj.
- P 9 monatoj ekde marto 2025 ĝis decembro 2025. La liveraĵo de la partoprenigo de la junuloj estos la kerno de la laborpakajo. Kvankam ĝi okazos post la fino de la instruado dum somero, la ekorganizado de ĝi devos jam komenci dum ankoraŭ la lernantoj ne finis la kursojn. Post la renkontiĝo mem, ĝi estos sekvata de longa raporto kaj pretigado de materialo por disvastigado de bonaj praktikoj kaj informado.
- D 36 monatoj ekde septembro 2023 ĝis septembro 2026. La liverado ene de tiu ĉi laborpakajo okazos konstante per la diversaj iloj disponeblaj de la diversaj partneroj. Ĝi finiĝos per lasta rekontiĝo de la projekto.



## Specifa kontribuo de esplorcentroj/universitatoj

La rolo de esplorcentroj kaj universitatoj estas limigita preskaŭ nur al la 2-a laborpakajo pri esplorado. La nura ekcepto estas la inkludo en la lasta laborpakajo, pri disvastigado de la projekto, kie la kunlaboro estas bonvena. Ĉefe per partopreno en la fina informada evento kaj per informado de la atingoj per la retoj de la esplorcentroj/universitatoj.

Akceptante partopreni en la projekto, la partneroj respondecos pri esplorado ĉirkaŭ la temo de la propedeŭtika valoro de Esperanto, la utileco de Esperanto kiel ilo por konstrui demokration, multkulturecon, disvastigi kontraŭdiskriminaciajn valorojn, ktp. Tiu respondecos inkludas ankaŭ la produktadon de materialo kiu utilos al la 3-a laborpakajo pri la kreado de instrua materialo pri Esperanto.

Kontraŭ tio, la esplorcentroj/universitatoj ricevos buĝeton de 7.000-9.100 € (tiu kvanto estas diskutinda. Tiu buĝeto celas kovri:

- laborhorojn de la esploristoj rilate al la esplorado pri la temo;
- raportadon de la nuna stato de la scienca scio pri la temo;
- kotizon por libera publikigo de scienca(j) artikolo(j) pri la temo;
- kotizon por partopreni sciencan kongreson;
- la subtenon de eventoj kaj agadoj por informadi kaj disvastigi la bonajn praktikojn;
- aldonajn administrajn taskojn kiuj estas bezonataj por realigi la liveraĵojn supre menciitaj.

Por kalkuli la buĝeton ni konsideras la jenon:

- 300 € por la kotizo de kongreso;
- 1.500 € por la skribado de scienca artikolo;
- 1.500 € por administraj kostoj;
- 3.100 € por labordediĉo de 1 esploristo;
- 600 € por vojaĝigi homon.

Ni atendas ke ĉiu esplorcentro/universitato:

- Provizu 1 aŭ pli esploristo(j)n por esplori pri la temo;
- Kontribuu al komuna raporto pri la nuna scio pri la stato de la temo;
- Publikigu almenaŭ 1 sciencan artikolon en indeksita revuo (JCR/Scopus);
- Sendi 1 aŭ pli esploristo(j)n al internacia kongreso por raporti pri la antaŭeniĝo en la esplorado de la temo.

Aldone, nedevige, la esplorcentroj/universitatoj povas ankaŭ:

- Organizati informadajn agadojn kaj eventojn pri la projekto;
- Sendi 1 homon al fina partnera evento por konkludi la projekton kaj disvastigi la rezultojn.



## Specifaj kontribuoj de Esperantaj asocioj

La rolo de Esperantaj asocioj aperas en preskaŭ ĉiuj partoj de la projekto. Ekzemple, la estra rolo, restas ĉe Esperanta asocio, sed tiu parto jam estas kovrita. La restantaj roloj por kiuj ni serĉas Esperantaj asocioj estas pli limigitaj.

En tiu senco, la roloj de la Esperantaj asocioj estas ĉefe duflankaj. Unue, ili respondecu pri la komunikado en la nacia lingvo. Dum la tuta projekto, la Esperantaj asocioj estu la pontoj kun la lernejoj, kaj kaze ke ni ne atingos lernejan partneron, Esperanta asocio anstataŭigu ilin (nur en ne ideala situacio). La dua ĉefa tasko de la Esperantaj asocioj estas provizi la trejnadon al la instruistoj (4-a laborpakaĵo). Evidente, la Esperantaj asocioj ankaŭ kunlaboras en la lasta laborpakaĵo pri disvastigado de la projekto kaj informado de la rezultoj. Laste, la Esperantaj asocioj partoprenas en la administrado de la projekto, ne kiel respondeculo, sed por subteno kaj kontroli la laboron, aldone al helpado pri la kunordigado de la partopreno de junuloj kaj instruistoj en eventoj.

Akceptante partopreni en la projekto, la esperantaj asocioj respondecos pri la organizado de la trejnadaj de Esperanto por instruistoj kaj subteno de la lernejoj dum la instruado al junuloj. Tio ankaŭ inkludas provizi la materialojn kreitajn el la 3-a laborpakaĵo (kiu estos disdonita al la Esperantaj asocioj), resti kiel referenckontaktoj por la lernejoj kaj komuniki problemojn, sukcesojn kaj demandojn al la administra teamo, provizi helpon kaze de bezono de kuturajn informojn/materialojn kaj faciligi informojn pri la bezonoj de lernejoj por la vojaĝoj. La Esperantaj asocio ankaŭ akceptas inkluzivi en sia agado aktivajoj kiuj utilos por la 7-a laborpakaĵo. Alivorte, la partneroj kontribuos al la disvastigado de la rezultoj per eventoj, afiŝoj en sociaj retoj, komunikado al amaskomunikiloj, ktp.

Kontraŭ tio, la esperantaj asocioj ricevos buĝeton de ĉirkaŭ 4.000-5.000 € (la fina kvanto estos individue akordita, kaj ĉefe dependas de la kvanto de labordediĉo, kiu dependas de la kvanto de lernejoj kiuj aliĝas al la projekto kaj de ĉu la Esperanta asocio devas ankaŭ roli kiel lernejo). Tiu buĝeto celas kovri:

- 30 horojn por la trejnado kaj pretigado de la kursoj por instruistoj;
- la partoprenon kaj vojaĝon de reprezentanto al fina informada evento;
- la subtenon de eventoj kaj agadoj por informadi kaj disvastigi la bonajn praktikojn;
- administrajn taskojn kiuj estas bezonataj por realigi la liveraĵojn supre menciitaj.

Por kalkuli la buĝeton ni konsideras la jenon:

- 600 € por vojaĝigi homon;
- 1.500 € por administraj kostoj;
- 1.400 € por trejnado de instruistoj;
- 500 € por organizado de eventoj kaj informado.

Ni atendas ke ĉiu Esperanta asocio:

- Ofertu minimume 1 kurson por 1 instruisto.
- Organizu ajna(j)n evento(j)n/renkontiĝo(j)n loka(j)n por la junuloj kaj instruistoj.
- Informi pri projekto al membroj kaj komuniku pri ĝi al eksteruloj nacilingve.

Aldone, nedevice, la lernejoj povas ankaŭ:

- Organizati informadajn agadojn kaj eventojn pri la projekto;
- Sendi 1 homon al fina partnera evento por konkludi la projekton kaj disvastigi la rezultojn.



## Specifaj kontribuoj de lernejoj

La rolo de la lernejoj restos ĉefe ĉe la 5-a laborpakaĵo, la parto pri la instruado de Esperanto. Malgraŭ tio, la lernejoj ankaŭ estos enplektitaj en aliaj laborpakaĵoj. Pli precize, la lernejoj sendos instruistojn al la 4-a laborpakaĵo pri trejnado de instruistoj (kiuj ankaŭ povos partopreni instruistan kongreson), sendos junulojn al la 6-a laborpakaĵo pri partopreno de junuloj en internacia evento kaj kontribuos al la informado kaj disvastigado de bonaj praktikoj.

Akceptante partopreni en la projekto, la lernejoj respondecos pri la organizado de la kursoj de Esperanto por junuloj kadre de ilia spaco. Dume, aliaj partneroj respondecos pri organizi la partoprenon de la instruistoj de la lernejoj en trejnado, provizos la instruistojn kun la materialo por instrui Esperanton kaj zorgos pri la kondiĉoj de la partopreno de junuloj en internacia evento (la lernejoj helpas rilate al la informado de junuloj kaj akordo de la kondiĉoj kun la familio de junuloj kiuj aĝas malpli ol 18 jarojn).

Kontraŭ tio, la lernejoj ricevos buĝeton de ĉirkaŭ 16.000,00-25.000,00€ (la fina intervalo estos individue akordita depende de la fina kvanto de partneroj kaj de la kvanto de kursoj kaj studentoj kiuj aliĝos). Tiu buĝeto celas kovri:

- 60 horojn de instruistoj (20 horojn por la trejnado, 30 horojn por la instruado kaj 10 aldonajn horojn por la pretigado de la kursoj);
- la partoprenon kaj vojaĝon de la junuloj al internacia evento;
- la partoprenon kaj vojaĝon de instruistoj en instruista kongreso;
- la subtenon de eventoj kaj agadoj por informadi kaj divastigi la bonajn praktikojn;
- aldonajn administrajn taskojn kiuj estas bezonataj por realigi la liveraĵojn supre menciitaj.

Por kalkuli la buĝeton ni konsideras la jenon:

- 1.500 € por administraj taskoj;
- 2.500 € por la trejnado de instruisto kaj instruado de kurso al junuloj;
- 600 € por vojaĝigi homon.

Ni atendas ke ĉiu lernejo:

- Provizu minimume 1 instruiston kiu trejniĝos kaj instruos Esperanton al junuloj;
- Ofertu minimume 1 kurson por inter 15 kaj 20 junuloj.
- Partoprenigu inter 10 kaj 20 junulojn en internacia evento.
- Informi pri la disponebleco de al kurso al la studentaro kaj familioj.

Aldone, nedevige, la lernejoj povas ankaŭ:

- Sendi 1 aŭ pli trejnitajn instruistojn al instruista kongreso;
- Sendi 1 aŭ 2 studentojn al pli malgranda internacia evento;
- Organizi informadajn agadojn kaj eventojn pri la projekto;
- Sendi 1 homon al fina partnera evento por konkludi la projekton kaj disvastigi la rezultojn.